

SUDFRANCIĀ STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio "LANGUEDOC-ROUSSILLON"
Jarabono: 20 F al Fédération d'Espéranto du Languedoc-Roussillon
CCP 956-28 P Montpellier

3a Kvaronjaro 1986

N° 98

Ni pretigu por la Jubilea Jaro !

Baldaŭ finiĝos la jaro 1986a, alproksimiĝas la jaro 2000a. Baldaŭ Esperanto estos centjara; ĉu tio signifas, ke ĝi ne estas adaptita al la nuna epoko ? Certe ne ! Tiu teksto estas tajpita sur komputila klavaro kaj skribita per komputila presilo. Antaŭ nelonge reformistoj insistis, ke oni ne povos tajpi esperanto-tekstojn per komputiloj, pro la super-signoj. Jen ekzemplo sur tute simpla, tiel nomata "familia" komputilo. La nura ĝeno estas, ke la klavaro estas "qwerty"-a kaj ne "azerty"-a, kiel sur skribmaŝinoj, pro tio, ke tiu komputilo estas fabrikata en Britujo, sed kompanse ĝi kapablas presi diversajn literojn : francajn (é, ù, ç), germanajn (ä, ö, ü, ß), danajn (æ, ø), svedajn (Å, Ä), italajn (ò, ì), hispanajn (Ñ, ~, ÷), eĉ japanajn (¥)

Teorie la maŝino kapablas paroli, tio estas legi fonetikajn simbolojn. Profesoro Pierre Janton klarigis al ni en Vauvert, ke dank'al la "DLT"-sistemo kaj iom modifita esperanto duon-aŭtomata traduko eblos post deko da jaroj... multe pli frue ol aŭtomata traduko de iu lingvo en alian lingvon. Ke la publiko aŭdos pri nia lingvo en 1987 pli ol kutime, tio dependas de ni. Ni kalkulu nur pri ni kaj ni ne atendu! Ek !

Jean Hénin.



Le 71ème Congrès Universel d'Espéranto qui a réuni à Pékin, du 27 Juillet au 22 Août 1986, 2482 congressistes venant de 53 pays,

Ayant traité, en contribution à l'année internationale de la Paix, le thème "Compréhension mutuelle, Paix et Développement" :

- met l'accent, dans un esprit d'égalité, sur le besoin d'une efficace communication linguistique internationale, pour la compréhension entre hommes de langues différentes et de conceptions du Monde opposées
- relève le fait que le progrès de l'Humanité dans les domaines sociaux, culturels et techniques n'est possible qu'aux conditions d'une Paix durable et stable, assise sur une véritable compréhension mutuelle.
- note avec satisfaction l'écho favorable et le soutien qu'a eus le congrès de la part des autorités chinoises, du gouvernement et des milieux politiques, culturels et scientifiques
- souligne le fait que la langue internationale Espéranto peut efficacement contribuer au resserrement des liens entre les pays d'Asie et entre l'Asie et les autres continents
- et appelle les gouvernements, sur la base de la résolution 23 du 11 Novembre 1985 de l'UNESCO en faveur de la célébration du Centenaire de l'Espéranto, à appuyer la langue internationale comme solution pour les échanges intellectuels internationaux, principalement pour le progrès scientifique et technique des pays en voie de développement.

FEDERACIA KOMITATKUNSIDO EN SETE (la 14-an de Septembro 1986)

Ceestis 8 el la 14 federaciaj komitatanoj plus dekduo da nekomitatanoj plejparte el Perpignan. Ni aparte ĝojis pro la ĉeesto de niaj du veteranoj : S-roj LLECH-WALTER (Perpignan) kaj DELIGNE (Narbonne). Venis neniu el Montpellier pro samtempa disvolviĝo de la tiea tiel nomata "Foire de Asocioj".

Paul TOURON (P.T) proponas, ke ĉiuj sin prezentu, ĉar novaj vizaĝoj estas nekonataj.

Jean HENIN (J.H) retroiras al la lastaj federaciaj eventoj kaj proponas novajn agojn prepare al la alproksimiĝanta jubilea jaro de Esperanto (1887-1987) :

- principa akcepto pri eldono de federacia informa faldfolio, en la franca lingvo, surbaze de tiu eldonita de la grupo de Rouen (pri praktika uzo de E) kaj de Montpellier (pri la lingva strukturo de E). Dank'al la bonvolemo de Montpellier-a samideano tre malmultekosta estos la prezo, kiun, poduone, povos elteni la federacia kaso. La principo estas unuanime aprobita. Camille BOUMAL (C.B) komencos rebaki la tekston. Poste sekvos la grupo de Béziers k.t.p.
- Charles GERARD parolas pri la preparo de la federacia kongreso en Collioure la 9-an kaj 10-an de majo 1987. Estas decidite oficiale inviti "Kataluna E-Asocio"-n.
- Suzanne AUTHIER (S.A) demandas al Jean-Pierre PERAY (J.P.P) pri aranĝo de grandaj (dumetraj) paneloj transporteblaj al E-eventoj por frapi la okulojn de la preterpasantoj.
- J.H. lige kun P.T. preparos komputilan programon dank'al kiu vizitantoj de E-eventoj povos ricevi tujan respondon al siaj demandoj pri E°.
- J.H. rilatos kun la agentejo POLONIA pri detalaj informoj por eventuala aranĝo de perbusa vojaĝo de Lyon al Varsovio, venontjare.

Jean AMOUROUX (J.A) esprimis sian deziron ne rekandidatiĝi por la sekretario posteno. Pro sanstata perturbiĝo kaj precipe pro tio, ke la pli juna Charles GERARD konsentis kandidatiĝi, per 7 aproboj kaj 1 sindeteno, la ĉeestantaj komitatanoj elektis la jenan estraron :

Prezidanto : Jean HENIN Vic-prezidantino : Yvette VIERNE
Sekretario : Charles GERARD Helpsekretario : Jean AMOUROUX
Kasistino : Lucette NEGRON

J.H. kunordigos la interrilatojn por la pretigo kaj eldono de "Sudfrancia Stelo", dum L.N. enkasigos, kontregistrigos kaj enlistigos la abonojn, kies kosto por 1987 senŝanĝe estas 20,00F.

J.H. sopiras pri prezidanta anstataŭo. Kvankam ne tro maljunaj ni estas, estus tre bone, ke nova kaj juna sango alvenu antaŭ ol aĝo kaj mal-sano forpuŝu nin.

Post la komuna tagmanĝo preskaŭ ĉiuj ni vojaĝis al Montpellier, kie disvolviĝis la tiel nomata "Foire aux Associations". Ĉe "Jardins du Peyrou" pli ol 400 lokaj asocioj havis budon pri siaj aktivadoj. La E-kulturcentro havis la numeron 246-an kaj tie ni plezure retrovis niajn amikojn Lentaigne, Diez, Cayzac, Capus, Celiqua k.a. Bonega agado pri kiu kontentis la deĵorantoj...kaj ni.

(protokolis J.A.)

ALDONAJ RIMARKOJ

Pri la menciataj paneloj : temas pri du Babel-turoj, sur la unua griz-kolora, kelkaj homoj sin esprimas, por bedaŭri, en diversaj lingvoj, ke ili ne komprenas sin reciproke. Sur la alia panelo, de fluoreska koloro, la homoj parolas komunan lingvon kaj ĝojas. Inter la du turoj diversaj standardoj...

Pri la regiona prospekto : ĝi iel similos tiun de la Rouena grupo (se vi deziras kunlabori, petu ekzempleron de J.H.). Sugestojn, proponojn faru al C. Boumal, 28 Rue du Canigou, Terrats 66300 Thuir, kiu bonvolas kunordigi. Sur la lasta paĝo ni indikos la telefon-numerojn de respondeculoj en la diversaj departementoj de la federacio, ĉiu grupo bonvolos elekti 1, 2 aŭ 3 numerojn.

Pri karavano al Varsovio:

Fakte temas pri du karavanoj : la unua koncernos tendumantojn kaj ruldomb-posedantojn. Jam pluraj federacianoj decidis kune vojaĝi al la Jubilea kongreso, kiu certe estos "granda" kongreso. Povas kuniĝi aŭtomobilistoj, kiuj loĝas en hoteloj. La dua estos verŝajne perbusa vojaĝo. La elirpunkto estos Liono, kiu estas facile atingebla de nia regiono, eventuale la elirpunkto povus esti Montpellier.

La agentejo "Polonia" sendis kelkajn detalojn.

Flugbileto de Liono al Varsovio (kaj reveno) kostas nun inter 2415 kaj 2990 F.


Trajnbileto (el Parizo): inter 1490 kaj 1550 F

Vizo kostas 120F (vizo por unudirekta traveturado de Ĉeĥoslovakio: 100F kaj de Orienta Germanio : 40F)

Device oni devas ŝanĝi po 50F aŭ 100F tage (50F por gejunuloj, gestudentoj kaj turistoj kun ruldomb/ 100F por la tendumantoj, ktp.)

Turistoj, kiuj loĝas en hoteloj, devas aĉeti hotel-kuponojn kaj ne estas koncernataj de la ĉi-supra ĉiutaga ŝanĝo.

Koncerne perbusan vojaĝon, kun tranoktado en Germanio survoje, 8taga restado kaj ekskursoj, oni kalkulu inter 36000F kaj 43000F.

 Kalkulu : se kunveturos 50 personoj, ĉiu pagos malpli ol 1000F por la transporto. Kompreneble aldoniĝas la restad-kostoj, la kongreskotizo, ktp. Tamen la afero estas realigebla. Faru proponojn, sugestojn al J. Hénin. Kompreneble venos aliaj proponoj pri karavanoj sed ni pretas kompari la prezojn kaj (mal)-avantaĝojn.

Se iu volas sin anonci por kunordigi la aferon, li/ŝi estos bonvena.


Kompreneble leĝe respondecos la agentejo, kiu rilatas kun la pola agentejo "Orbis", kaj povas rezervi hotel-ĉambrojn, espereble proksime de la kongresejo ! Sed NI devas trovi la partoprenantojn !

NE REVU PRI LA JUBILEA KONGRESO : VENU KUN NI AL VARSOVIO EN 87 !

Gratulojn kaj Dankojn

Konklude de tiuj du paĝoj pri la lasta federacia kunveno, ni ne forgesu gratuli Charles Gérard, nian junan novan sekretarion, kiu konsentis respondeci pri tiu posteno kaj Jean Amouroux, kiu tiel longe kaj sindoneme deĝoris kaj plu kunlaboros en la kuliso.

Dankon, Charles ! Dankon, Jean !

 La tria Rodana E°-Rendevuo de "Literatura Foiro" koop. en AVIGNON okazos la 18an kaj 19an de Oktobro.

Kiel kutime pluraj grupoj : A: por "kompletaj" komencantoj, B/ por paroli, ridi... kaj progresi, C: por aŭskulti prelegojn.

Sabate, post la vespermanĝo, spektaklo : "Kandido" de Voltaire, kanzonoj (M. Cavelan), ktp.

Petu detalojn kaj aliĝilon de S. Humm 1, Rue Damian 84000 Avignon.

Se vi ne povis iri al Pekino, la Paderborna E°-Centro aranĝas tri aŭtunajn kaj vintrajn flugvojaĝojn al Ĉinio (23 X-7 XI; 29 X -14 XI; 20 XII - 3 I). Kalkuli 6000 DM.



La ⁴ Apuso

APUSO (kies scienca nomo estas "apus apus") estas malgranda birdo, 16 centimetrojn envergura. (en la franca: martinet). Ĝi parencas kun hirundo, sed estas pli larĝa; ĝiajflugiloj estas tre longaj, pintaj, falĉilformaj, la vosto mallonga. Ĝia flugado estas tre rapida. Ĝi vivas esence en aero kaj sin nutras el insektoj.

En Nîmes, nia grupo sekvas studon pri apusoj, kiuj vivas en muzeo, malnova konstruaĵo, kie multnombraj truoj en la muro permesas al tiuj simpatiaj birdetoj konstrui siajn nestojn, al kiuj ili revenas ĉiujare, virapuso kun virinapuso, ĉiam same en paroj. Ili ne long-tempe restas en niaj landoj, nur por naski du aŭ tri apusidojn, kiuj rapide lernas flugi por reiri kun siaj gepatroj al malproksimaj afrikaj landoj.

La problemo estas scii, kion ili faras en tiuj malproksimaj landoj. La sciencistoj, kiuj studas tiujn birdetojn, revas iri kaj viziti la scienculojn de tiuj landoj, kiuj studas ilin. Sed la multekosta vojaĝo ne ankoraŭ ebligas tion.

Mi dezirus montri, ke Esperanto povus helpi ilin, se mi povus interrilatigi tiujn malproksimajn kaj malkomprenemajn homojn.

Mi alvokas ĉiujn samideanojn, kiuj povus helpi en tiu ago skribi al mi. Korajn Salutojn.

Paulo Touron, 3 Rue de Combret 30000 Nîmes.

Bonega ideo, kies efiko dependas de ĉiu. Eble vi havas korespondanton en Afriko; eble S-ro Braet povus helpi pere de "Nia Tamtamo". Helpu aŭ konsilu nian samideanon!

TURISMO

Ni legis en la septembra numero de "La Migranto", la oficiala ligilo de la esperantistoj natur-amikoj (Jarabono 30F- reklamo sen profito!) raporton pri "Promenado en Kapadoco" de nia

federacianino M. Maurin. Jen la konkludo de tiu interesa raporto:

"Imagu la ĝuon, plenigi dum horoj viajn okulojn per tiu mirinda pejzaĝo, revene balanciganta je ĉiu paŝo sur la dorso de trankvila azeno. La Kapadoco estas vere sorĉa regiono, kies viziton oni neniam bedaŭros, nek forgesos".

Pri tio jam konvinkinĝis tiuj, kiuj vidis la lumbildojn de S-ro Diez en Montpellier aŭ Vauvert. Guste atingis nin letero de S-ro Yalçin, kiu planas larĝskalan instruadon de E° en Turkio per koresponda kurso. Por tio, li ankaŭ bezonas la helpon de eksterlandaj Esperantistoj (vi!!!) por ekzemple gastigi novan esperantiston, ktp.

Kun sia edzino, S-ro Yalçin proponas veni al Eŭropo kun du video-filmoj ("Antikva Istambulo" kaj "La Blua vojaĝo"), kiujn li rajtigas vin kopii.

Interesa propono, ĉu ne? Ĉar profesie li okupiĝas pri turismo, li povas aranĝi iam ajn viziton de Turkio aŭ de Istambulo. Eĉ, se vi varbas aliajn personojn, la restado povas esti senpaga....

Letero

Ni ankaŭ ricevis leteron de nia fidela leganto R. Colney (Gap). Li skribis al la "Ministrino", respondeca pri "francophonie", koncerne la staton de la franca lingvo... en Francio, pro la malnecesa uzado de la angla-usona (aŭ frangla). Pri tiu sama temo aperos artikolo en baldaŭa SFS en la serio "Pri la angla".

Jen la respondo de la sekretario de S-ino Michaux-Chevry:

... "elle m'a dit combien elle partageait vos préoccupations sur la place de l'expression française sur le territoire national ... Vos remarques ... nourrissent la réflexion qu'elle mène sur les mesures à proposer en ce domaine".

Ni atendas decidojn...



LASTMINUTA MESAĜO: DUA PEDAGOGIA SEMINARIO DE UFE-GEE JE PASKO 87

EN LYON: "Instruado de E° al gejunuloj kaj prezento de la eksperimento de Villefranche".

La lingva angulo⁵

La Federacianoj, kiuj partoprenis la dimanĉan kunvenon de nia lasta kongreso en Vauvert, certe memoras pri la prelego de Profesoro Janton: "Esperanto kiel ponto-lingvo en la tradukprojekto Distribuita Lingva Tradukado (D.L.T.) de la nederlanda firmao B.S.O". Pri tiu permasina traduksistema lingvaĵo, per kiu Esperanto eble venkos, P. Janton donas detalojn por la legantoj de "Sudfrancia Stelo".

Esperanto kaj I.L.

Kiel sciante, grava informadika firmao en Nederlando estas ellaboranta aŭtomatan traduksistemon DLT, en kiu informoj en diversaj lingvoj estas tradukotaj al diversaj lingvoj pere de iu artefarita lingvo. Ĉar tiu lingvo devas esti perfekte regula, Esperanto estis elektita kiel elirbazo. Tamen en pluraj aspektoj Esperanto devis esti pli precizigita kaj la rezulta lingvo (IL) iom diferencas de ĝi. Ĉar tiu lingvo estas destinita nur al la tradukmaŝinoj, la uzantoj de tiuj maŝinoj tute ne bezonos scii ĝin, eĉ scii pri ĝi. Jen kelkaj el la ĉefaj trajtoj:

-Kompleta aglutineco: manĝintas, manĝontis. Pro tio estas necese klare dividi la morfemojn per skriba signo kiel en la unuaj jaroj de Esperanto. Tiamaniere dik'a'j distingiĝas de kaj, uz'u de kiu, kaj nom'i de mi.

-Artikoloj estas pluraj. Krom la plej bela pejzaĝo oni havas: le plej bela en tiu lando estas la pejzaĝo (en tiu frazo le sinonimas proksimume kun tio). Tria artikolo estas le por signi la komencon de substantiva sintagmo, kiam povas ekesti konfuzo: Ekz. La flughaveno havas ok elektrajn le pasaĝerojn portantajn veturilojn. Se ne ekzistus le, la tradukaparato komprenus: "ok elektrajn pasaĝerojn".

-la personaj pronomoj estas kompletigitaj tiel:

li:preparolata persono senrigarde al ties genro	}	ili:pluraj preparolataj personoj aŭ objektoj
ĝi:preparolata objekto		
hi:preparolata viro		ih:pluraj viroj
ŝi:preparolata virino		iŝ:pluraj virinoj

-La verba sistemo ricevas senaspektan pasivon: la letero skribajtas = la letero estas skribata/skribita.

La at/it pasivoj plu ekzistas kiel adjektivoj: la muro estas farbita = ĝi havas farbon sur si.


-La akuzativo de direkto eblas nur kun adverboj. Ekz. ĝi flugas supren. Sed oni devas diri: ĝi flugas ie-al Hamburgo, sendi ie-en la kosmon.

Eĉ supraĵa superrigardo de IL montras ke, en sia nuna stato, ĝi diferencas de Esperanto ĉefe pro sia sisteme aglutineca karaktero kaj pro la enkonduko de precizigaj morfemoj por distingi la funkciojn kaj tiel eviti konfuzojn, kiujn la aŭtomato povus fari. Pro tio oni devis distingi prepoziciojn de subjunkcioj (antaŭ/antaŭ ke; anstataŭ/anstataŭ ke), adverbojn de subjunkcioj (apenaŭ/apenaŭ ke), konjunkciojn de subjunkcioj (ĉar/ĉar ke), la tempan de la loka signifo de kelkaj prepozicioj (iam-en, ie-en), k.t.p.

La celo de ĉio-ĉi ne estas plibonigi Esperanton sed alĝustigi ĝin al la kapabloj de la maŝino, kiuj estas multe pli limigitaj ol tiuj de la homa inteligento. Oni do ne juĝu Esperanton laŭ la normoj de la maŝino sed oni rimarku, ke la maŝino per siaj drastaj logikaj postuloj povas atentigi pri kelkaj malperfektaĵoj en Esperanto. Ni atendu, ĝis kiam IL estos finpreta por decidi, ĉu Esperanto povas lerni ion de ĝi.

La kasedo de Profesoro P. Janton: "Pri la problemoj de internaciaj lingvoj", registrita dum nia kongreso de Vauvert estas ĉiam mendebla al S-ro Capus. Aŭskultu ĝin, aŭskultigu ĝin, eĉ donacu ĝin! (prezo: 25F + sendkostoj 3F)

La cassette du Professeur P. Janton: "Problèmes des langues internationales" enregistrée pendant notre congrès de Vauvert peut toujours être commandée chez Mr Capus 15, Rue des Frères Platter 34000 Montpellier. (25F+envoi 3F) Ecoutez la, faites la écouter (elle est en français) ou même offrez la!



Letero el Nimo (5)



(En la antaŭaj leteroj VALO faris rimarkojn pri Esperanto kaj la movado, pri rasismo, la politikistoj kaj Esperanto, ktp. Hodiaŭ ne temas pri letero sed pri ekstrakto el la ĵusaperinta libro : " El la "Pensoj" de Blazio Paskalo", tradukita el la franca originalo de Valo (eldonita de "Sat-Broŝurservo" kaj mendebla al la federacia libro-servo (15 FF)).

610. La forto estas la reĝo de l'mondo, ne la opinio. Sed la opinio estas tiu, kiu uzas la forton. - Estas la forto, kiu faras la opinion. La moleco estas bela laŭ nia opinio. Kial? Car kiu volos danci sur ŝnuro* , tiu estos sola; kaj mi faros kabalon pli fortan, el homoj, kiuj diros, ke tio ne estas bela.

611. Iuj bone parolas kaj malbone skribas. Tial ke la loko, la ĉeestantaro varmigas ilin kaj ĉerpas el ilia spirito plimulte ol ili trovas en ĝi sen tiu varmo.

.....
613. La lingvoj estas ĉifroj en kiuj, ne la literoj estas ŝanĝ-
-itaj per literoj, sed la vortoj per vortoj, tiel ke nekonata lingvo estas deĉifrebla.

614. La diverseco estas tiel ampleksa, ke ĉiuj voĉtonoj, ĉiuj manieroj marŝi, tusi, nazpurigi, terni... Oni distingas el la fruktoj la vinberojn, kaj inter ĉi tiuj la muskatojn, poste la Kondrian, poste la Desargan, kaj poste tiun grefton. Cu ĉio? Cu iu vito iam produktis du samajn traŭbojn? Kaj ĉu iu traŭbo havas du samajn berojn? ktp. Mi neniam juĝis ekzakte same pri sama afero. Mi ne povas juĝi pri verko ĝin farante. Necesas ke, kiel la pentristoj, mi malproksimiĝu. - Sed ne tro. - Do kiome? - Divenu!

615. Tiuj, kiuj faras antitezojn troigante la vortojn, faras kiel tiuj, kiuj faras falsajn fenestrojn por la simetrio. Ilia regulo ne estas paroli ĝuste, sed fari figurojn ĝustajn.

.....
617. Ili diras, ke la eklipsoj kaŭzas malfeliĉon, ĉar la malfeliĉoj estas ordinaraj, tiel okazas tiel ofte malfeliĉoj, ke ili ofte divenas, dum, se ili dirus, ke eklipsoj anoncas feliĉon, ili ofte mensogus. Ili atribuas feliĉon nur al maloftaj ĉielaj renkontoj; tiel ili malofte maltrafas diveni.

618. Ekzistas nur du specoj de homoj: unuj justaj, kiuj sin kredas pekuloj; aliaj pekuloj, kiuj sin kredas justaj.

.....
632. Elokvento estas pentro pri la penso; tiel, kiuj pentrinte ankoraŭ aldonas, tiuj faras pentraĵon anstataŭ portreton.

* * *

Notoj: ŝnuro*/Danci sur ŝnuro estas malfacile kaj danĝere. Cu mi devas danci sur ŝnuro? (Epikteto)

.....=streklinio indikas ke tiu parto de la originalo ne estas konservita en la traduko.

VIVO de la GRUPOJ

PERPIGNAN

La ĝenerala asembleo de la Kultura Centro okazis la 29an de Septembro. Tiun-ĉi jaron funkcios du kursoj:

Lunde: (de la 17a ĝis la 18a h) Konversacia rondo (Sro Boumal)

Marde: je la samaj horoj, kurso kun "Por la praktikantoj (Sro Benazet).

Oni ankaŭ elvokis la federacian kongreson de Majo 87 (en Collioure). Post la asembleo S-ino Payret kaj F-ino Manguine, kiuj vizitis la kongreson de Pekino, montris belegajn lumbildojn pri tiu fora lando. Ni certe revidos tiujn lumbildojn en Collioure.

La grupo bedaŭras la transloĝigon al la insulo Reunio de la familio Charlet. Al siaj fidelaj membroj Mylène, Candide kaj ilia patrino, la grupo deziras bonan vojaĝon kaj rapidan adaptigon.

Alvoko al la federacianoj, kiuj partoprenis la kongreson de Pekino:

Estas dezirataj raportetoj pri la kongreso kaj pri la spertoj en Cinio por la decembra numero de SFS. Anticipan dankon !

Same ni ŝatus prezenti en Collioure lumbildojn kaj filmojn pri la sama temo, por kompletigi la lumbildojn de niaj samideaninoj el Perpignan. Kontakti Charles Gérard, 4 Rue Docteur Rives 66000 Perpignan, kiu prizorgas la organizadon de la venonta federacia kongreso.

BEZIERS:


Dum la lastaj monatoj, ne multaj eventoj okazis en la grupo.

Ciuj "forflugis" en la naturon por ripozi. Tamen la plej kuraĝaj partoprenis la U.K. en Pekino. Gi ne proponis ripozon; male, la partopreno en la diversaj eroj postulis multe da tempo, da paŝoj en varma kaj malseka klimato. Tamen neforgeseble ! Pli ol 2000 kongresanoj el 53 landoj, kaj la unuan fojon oni povis renkontiĝi, paroli kun Cinoj. Generale, ili bone parolas kaj prononcas, ofte multe pli ĝuste ol iuj Francoj. Hontinde por ni ! Ekster la kongreso, en 3 aliaj urboj, la franca grupo estis akceptita de ĉinaj samideanoj, multaj, plejparte junaj. Aparte en Shangai, la akcepto estis sufiĉe impona, varma, en granda salono kun kantoj kaj trinkaĵoj. Ankaŭ hispana grupo estis samtempe akceptita. Mi ne povas raporti pri ĉio : necesus pli da paĝoj, ol kiomtenas nia modesta ligilo. Oni povas nur bedaŭri, ke, pro la granda distanco la vojaĝon ne povis facile partopreni multaj el ni.

S. Authier.

SFS notas kun plezuro la pretecon de nia samideanino skribi... kelkajn paĝojn pri tiu bela vojaĝo al Azio...

ATENTU ! La kutima LINGVOSTAGO okazos de la 28a ĝis la 31a de MAJO 87, kiel lastan fojon en la kastelo CASSAN apud Roujan (je 20 km de Béziers).



Laŭ la deziroj de pluraj staĝanoj la laboro komen-
-ciĝos jam ekde la 28a matene. Do, oni povos, se eble
devos, alveni en Cassan la 27an posttagmeze.
Car la restado estos pli longa kaj la pensionprezo
en la kastelo altiĝis, ni devos kalkuli por la tuta
restado 450 F. La aliĝkotizo estas 20 F ĝis la 31a
de marto, 30 F poste. Junuloj malpli ol 25jaraj ne
pagas aliĝkotizon. Ebleco kampadi en la kastelo je
malalta prezo. Vi trovos aliĝilon en la venonta SFS.

NIMES:
+++++

Kurso -unua kaj dua grada- disvolviĝas ĉiulunde, de la 15a ĝis la 17a h. en la Centro Pablo Neruda. Gvidas la kurson S-ino Soulier. Estas uzata la kurslibreto de S-ino Volpelière. Post la kurso okazas konversacia rondo.

Du lernantinoj de S-ino Volpelière : Fraŭlinoj Candel Marie kaj Ribard Marie-Joelle, post nur 18 monatoj da lernado, partoprenis la Universalan Kongreson en Pekino.

Atesto pri lernado: S-ino Soulier registris la sukcesojn de S-ino Destrez Sylviane, S-ro Porre Roger, F-inoj Fournier Diane kaj Soulier Sylvie. Aparte menciindaj estas la sukcesoj de tiuj du lastaj 9 jaraj knabinoj. Trejnitaj de la konata avino de Sylvie kaj perfektigintaj en Grésillon, ili tie trapasis la ekzamenon. Gratulojn al ĉiuj !

MONTPELLIER:
+++++

La kursoj komenciĝos la 16an de Oktobro en la U.T.T. (Universitato de la Tria Tempo).

- vendredon matene (de la 9a ĝis la 11a h.): Komencantoj (S-ino Dennebecq)
- ĵaŭdon matene (de la 10a ĝis la 11h30 h.): Duagrada kurso (S-ro Lentaingne)
- ĵaŭdon matene (de la 9a $\frac{1}{2}$ ĝis la 11a $\frac{1}{2}$ h.): Triagrada kurso (S-ro Capus)

Alia kurso okazos en "Maison pour tous Joseph Ricôme -Rue Pagès"
-vendredon postagmeze je la 18a horo -por komencantoj.

La monataj kunvenoj okazos kiel kutime la unuan merkredon de la monato je la 20a $\frac{1}{2}$ h. en la "Maison pour tous Joseph Ricôme". Komence de Septembro la grupo gastigis ĉekan paron.

INFORMO ESTAS ANKAŬ JUBILEA AFERO

Jen kelkaj konsiloj por fari pli interesaj niajn renkontojn cele al interesiĝo ĉe la eklerntoj:

La unua kialo de renkontiĝoj, eĉ inter francparolantaj esperantistoj, estas la *plibonigo de nia scipovo* en kontaktoj kun pli spertaj samideanoj.

En organizitaj aranĝoj, eblas konatiĝi kun *fremdaj vizitantoj*, aŭskulti prelegojn de *turneaj fremduloj*.

Oni povas *registri kasedojn* interŝanĝeblajn kun aliaj grupoj, ĉu en Francujo (raporti la vizitojn de fremduloj al aliaj kiuj ne havas tiun ŝancon...), ĉu eksterlande (sendi parolajn mesaĝojn al aliaj grupoj okaze de solenoj, datrevenoj... atende al ilia reciproke).

Eblas skipe kribri *bultenojn, gazetojn, cirkuletojn*... kaj komenti alies spertojn; *recenzi novajn librojn* en la ĉirilataj fakoj de la revuoj antaŭ ol decidi ilin aĉeti, kaj krei bibliotekon.

Oni *respondas al gazetoj* pri aperintaj artikoloj, oni donas siajn opiniojn.

Kial ne organizi *ludetojn* (vortaroludoj eblas por pligranda riĉigo de la scipovo)? Oni kreu *vortoludojn* por siaj gazetoj, aŭ oni komune respondu aliajn.

Interese estas fari *sian propran teatron* per komuna legado de teatraĵo, en kiu grupano ludas unu rolon.

Oni povas *reaŭskulti radio-elsendojn* el Varsovio, Pekino, Romo... kiujn iu sukcesis registri. Oni komentas, alskribas ilin.

Kial ne *kompili dokumentojn pri sia urbo*, ilin esperantigi, por partopreni en la turisma dokumentaro iniciatita de UFE? Ankaŭ sur turisma tereno, kial ne *prepari vizitskemon de sia urbo*, aŭ kvartalo, kun plano por vizitoj al monumentoj, preĝejoj, ĝardenoj, gravaj firmaoj... Tiun skemon, oni povas tajpi kaj fotokopii por fremdaj vizitantoj (kiuj povos uzi ĝin se ne prezentiĝos libera gastiganto).

La ekzemplo de *vizitinto de universala kongreso*, kiu *priraportas ĝin*, kaj montras notojn, fotojn... estas refarebla de ĉiu kiu faris vojaĝon okaze de laboro aŭ libertempo.

Sian kantonon oni povas provi por *preparo de festoj* (oni menuu la kasedojn de niaj kantistoj); *skeĉojn oni povas provludi* cele al kongresa prezento, aŭ festivalo.

Alia nemalhavebla laboro estas la *preparo de ekspozicio*, aŭ la ĝisdatigo de dokumentoj inter du foiroj.

Tre oportuna ero estas ankaŭ la *prezento* far ĉiu unuopulo de *sia propra profesio*. Ankaŭ tiel oni povas uzi pli facile ĉies spertojn en la komuna vivo.

Montpellier : FOIRO DE LA ASOCIOJ

En Montpellier la Foiro de la Asocioj okazis la 14an de Septembro. Kiel kutime pluraj dekoj da vizitantoj interesiĝis pri nia stando, kaj informiĝis pri E^o, pri la disvolviĝo de la lingvo. Informaj folioj estis disdonitaj : kelkaj simplaj klarigoj kaj la adreso de la loka grupo, por ke ĉiu havu la eblecon skribi, peti klarigojn se necese pri la proponitaj kursoj. Almenaŭ tiuj, kiuj ricevis tiujn informilojn, scios, ke E^o ekzistas kaj disvolviĝas. Kelkaj enskribis siajn nomon kaj adreson en speciala kajero (tio estas eta enŝoviĝo !) por ricevi kunvokilon pri la kursoj : lokoj, tagoj, horoj. Kio plej interesis la vizitantojn, estis la diverseco de eksterlandaj periodaĵoj (germana, bulgara, korea, ĉina...) kaj fakaj revuoj (fervo-
-jista, religia, medicina, scienca...) kiujn ili povis libere foliumi; ankaŭ aviztabuloj kun paĝoj aŭ fotokopioj protektitaj de plasta folio el "Asteriks la Gaŭlo", "La krabo kun oraj pinĉiloj", "la Malnova Testamento", "la Nobla Korano" (dulingva : la araba teksto logas la rigardon !), kaj ankaŭ, ĉefe, du sinoptikaj kaj skemaj grafikaĵoj, kiuj montras la relativan gravecon de la ĉefaj lingvoj en la mondo, la komparaĵon de la necesa tempo por samgrade lerni fremdajn eŭropajn kaj esperantan lingvon. Bona sukceso kaj kontentiga tago por la deĵorantoj.

Gratulojn al niaj sindonemaj gesamideanoj. Ni esperas, ke la nombro da varbitoj estos justa rekompenco por ilia strebado. La materialo uzita en Montpellier estas kompreneble je la dispono de aliaj grupoj aŭ izoluloj, kiuj dezirus partopreni samtipe "foiron" aŭ starigi ekspozicion okaze de la Jubileo. Espereble estos disponeblaj venontjare la du "allogaĵ" paneloj, priskribataj sur la paĝoj 2a kaj 3a. En unu el la venontaj numeroj de SFS, ni aperigos konsilojn kaj rimarkojn por tiuj, kiuj intencas teni budon okaze de "foiro de asocioj".

* * * * *

Anekdoto koncerne la foiron de la asocioj de Montpellier:

En tiu foiro estis pli ol 400 standoj; do kompreneble ĉiu asocio provis allogi la vizitantojn, ĉu per bruo, koloroj, rimarkebla objekto, slogano... "La domo de Heidelberg" tenis standon (Heidelberg estas la ĝemelurbo de Montpellier en Germanio, kaj "la domo de Heidelberg" provas instrui la germanan lingvon por plifaciligi la kontaktojn). La grandlitera slogano de tiu asocio estis : "la angla ne plu sufiĉas, lernu la germanan!". Eble estis standoj pri la hispana, la japana, la ĉina, la araba, la rusa... Neniu lingvo sufiĉas, ĉu ne ? Krom unu, kiun la Esperantistoj uzas... Estus facile trovi sloganon por E^o-stando.

En prospekto disdonita de la "domo de Heidelberg" troviĝis la apuda desegnaĵo. La centra junulo respondas al anglo kaj germano, ke li parolas iliajn lingvojn. Ĉu vi rimarkis, ke la juna germano portas sur la vesto... tre videblan stelon? Pro tio ni aldonis la esperantan ver-

-sion: -CU VI PAROLAS ESPERANTON ?

-JES, KOMPRENEBLE !

Slogano por la Jubileo

1887*1987
L'Espéranto a 100 ans
et se parle dans
plus de 100 PAYS



9a INTERNACIA SEMAJNO :

Gi okazis en la Alpoj, pli precize en Alta Savojo en la "Verda Valo", por la unua fojo. 40 partoprenantoj el 5 landoj regule sekvis la tri kursojn, tiel diligente, ke 4 sukcesis ekzamenojn.

Kiel kutime la etoso estis ege agrabla. Ni konatiĝis kun la regiono, kiu estas belega; ni vizitis la valon de Abondance kaj la klostron, la mezepokan urbeton Yvoire, bele florumitan, la "cirkon de la ĉeval-hufofero", les Voirons... La kuraĝuloj piede promenis sur la montoj; iun tagon ni admiris "la Blankan Monton; vere impona vidaĵo !

Dum la vesperoj ni vidis diapozitivojn pri Cinio, pri Turkio, ni kantis, ni multe dancis dank'al la lecionoj de Gerhart, ĝuis skeĉojn sed la plej interesa estis la vespero kun Claude PIRON, kiu kantis kun la edzino, akompanataj per gitaro, kaj diris poemojn. La postan matenon Claude Piron ravis nin per duhora prelego : "Pace pri Cinio" aŭ "Cine pri Paco".
Jurnalisto de "Dauphiné Libéré" vizitis nin (vidu la apudan raporton).

*Gratulojn al la organizintoj kaj la partoprenintoj !
Bonege, ke "Dauphiné Libéré" menciis tiun eventon, ĉar fine de Junio aperis artikolo en tiu gazeto, kiu ne estis favora al Esperanto.*

La deka internacia semajno okazos en 1987 denove en Sète.

► HABERE POCHE

Semaine internationale espérantiste



(Le Dauphiné Libéré)

Thonon les Bains : Organisée par le centre culturel espéranto de Montpellier, une semaine internationale consacrée à l'étude de cette langue a réuni une cinquantaine de personnes à la maison familiale « Joie de vivre » à

Habère Poche, du 30 août au 6 septembre dernier. Français venus des quatre coins du pays et notamment de Rhône-Alpes, mais aussi Allemands, Suisses et Japonais ont profité de ce séjour pour parfaire leurs connais-

sances et surtout communiquer entre eux grâce à l'espéranto, instrument de communication universel qui fêtera l'an prochain son 100ème anniversaire.

Notre photo : Le groupe réuni dans la vallée Verte.

ANONCETOJ

11

Découvrez des amis dans 107 pays avec l'espéranto, langue internationale. - Renseignements et cours par correspondance : R. Imbert, int. Kultura Servo, Anruseva 5, 41 000 Zagreb/Yougoslavie.

Pourquoi apprendre 12 langues étrangères pr pouvoir correspondre av. seulement la moitié du monde alors qu'une seule (et la plus facile) la langue internationale ESPERANTO suffit pr communiquer avec le monde entier ? Rens. grat. C/env. affran. (ou coupon-réponse) à GAEC 123, r. de Royan 16710 St-Yrieix 45-95-41-82

1887 ★ 1987
CENTENAIRE
de la
LANGUE INTERNATIONALE
ESPERANTO

Anoncetoj estas simpla rimedo por reklami kaj atingi kelkajn milojn da legantoj. En multaj urboj ekzistas tiuj ĉiusemajnaj aŭ dusemajnaj gazetoj, senpage kaj amase disdonataj; anoncetoj en tiuj gazetoj ne estas tro multekostaj; ni pripensu tiun eblecon por varbi.

Pri efiko estas alia problemo. La unua anonco aperis en gazeto de la regiono antaŭ unu jaro, sen granda rezulto, eble pro la adresoj eksterlande. La dua aperis en la katolika magazino "La Vie" antaŭ kelkaj semajnoj. "GAEC" estas aktiva asocio, kiu inter aliaj eldonas gluetikedojn (vidu dekstre: tiu etikedo, gluebila ie ajn, estas vendata ĉe nia libro-servo (po 30c.)). Antaŭ nelonge GAEC (Groupe d'action pour l'E° dans les écoles/ ne temas pri terkulturistoj) eldonis novan poŝtkarton, kies blua koloro ne ebligas fotokopion (1F30 ĉe nia libro-servo). Grafike ĝi estas alloga kaj reprezentas lokomotivon kiel antaŭ cent jaroj kaj modernan aviadilon kiel nun. Inter tiuj du transportiloj granda verda stelo kaj la vorto Esperanto. La akompananta teksto estas en la franca lingvo kaj E°: "centjara jubileo de internacia lingvo Esperanto je servo de centjara progreso". Trafa poŝtkarto, kiu meritas sukceson. Mendu kaj uzu ĝin!

Alia anonceto (vidu sube) baldaŭ aperos -trifoje sinsekve- en la teleprogram-revuo "Telerama". Temas pri jubilea informkampanjo, kiu "celas diskonigi la

fenomenon Esperanto kaj instigi homojn informpeti". Interesa ideo; certe la premioj allogos kaj instigos sed ĉu la prezo ne estos bremsa? (la citita prezo estas la plej altkosta el deko da eblecoj pro tio, ke ĝi inkludas abonojn, plenan vortaron, bildvortaron, ktp. Ekzistas feliĉe alia malpli kosta "promocio").

Se vi deziras kontribui al tiu kampanjo, petu la afiŝeton eldonitan de UFE, kiu referencas al "Telerama" kaj anoncas tutmondan rondiron kiel premion...aŭ montru la revuon kaj la anoncon al aliaj homoj!

Okaze de tiu kampanjo UFE proponas je speciala prezo (200F -sendokosto entenata) kolekton da ok libroj por eklernantoj: "Gerda malaperis", "La sentimulo", "la verda koro", "tridek roluloj", "Kumeaŭa, la filo de la ĝangalo", "legolibro por kursanoj", "kiu estas Jozefo?", "pordoj".

Baldaŭ en Parizo

kvara festivalo kanzon-teatra

29-30ajn de novembro 1986

LA LANGUE INTERNATIONALE.

ESPERANTO



Le monde entier
demain
facilement


étude rapide
seul ou par correspondance
ex.: cours complet

F. 1950
(étudiants — 30 %)

Doc. 42-78-68-86
Infos. 48-87-07-42

UNION FRANÇAISE POUR L'ESPERANTO
4 bis, rue de la Cerisaie 75004 PARIS
Agréée Minist. Educat. Nle et Formation continue.

KRUCVORTOJ de René Raynaud
 (R = Radiko)



Horizontale: I. Velboato
 II. Arbusto sen busto. Volano sen lano. Serio da nomoj.
 III. Molusko. Esti en iu loko (R).
 IV. Elemento radioaktiva, inerta gaso R. n. Post tre : en eksterordinare alta grado.
 V. Antaŭ "kalo" : parto de konstruaĵo, precipe p.p. loĝejo. Gi transportas la tripanozomojn.
 VI. Franca riverhavena urbo (R). Duonvarma (R).
 VII. Rita vesto uzata por Diservo. Membro de grupo. VIII. Zorge konservi en la memoro Famkonataj estas tiuj de Manso (R).
 IX. Lentiska rezino (R). Inversita sufikso.
 X. Gi estas pli bona sen ...oro, ol oro sen honoro (R). Peco el ligno aŭ metalo, pli longa ol dika. XI. Mediteranea herbo aŭ arbedo. Faruno produktata el la tubero de manioko. XII. Giaj ruinoj troviĝas apud Issarlik. Venena serpento (R).

Vertikale: 1. Rapide ŝanĝiĝanta (R). Riski sumon en ludo (R).
 2. Senkapigita malgranda ĉareto... aŭ plurjara planto. 15a litero de la greka alfabeto (R). 3. En la komenco de rakonto. Tutmonda societo, kiu celas helpi al la homaro. 4. Speco de friponoj. 5. Piedvesto (R).
 6. Verkisto de filmaj scenaroj (R). 7. Inverse : montra pronomo. Alterna sono de horloĝo (R). 8. Prepozicio aŭ artikolo inversita. Por la hundoj. Sovaĝa porko (R). 9. Inter Polujo kaj G.D.R. (R). Du samaj vokaloj. Gento. 10. Kiropraktikisto (R). Kruda, necivilizita persono (R). 11. 24 horoj (R). Inversita pronomo. Speciala al unu parto de spaco. 12. Oni lin vidas en la areno. Konjunkcio.

* * *

LUDO : Kaŝita verktitolo.

Ĉi tiu el la ĉi-subaj vortoj deprenu unu literon, tiel ke la restantaj formu novan vorton. La deprenitaj literoj laŭ orde vicigitaj donos al vi la titolon de grava Esperanta verko

* * *

PLANO - PLANO - MIENO - KANTO - AVELO - PIANO - PLACO - UTERO - MASTO -
 BESTO - BRETO - IRIZO - KASTO - MUARO - KREVI - FIOLO - MARTO - MARTO -
 ARENO - KRANO - ORELO .

respondo :

Du invitoj

La kooperativo de Literatura Foiro
 invitas vin al la

**3a Rodana
 Esperanto-Rendevuo**

en Avignon, Francio
 Kastelo de La Barbière

18-19 oktobro 1986

* * *

La Kataluna
 Esperanto-Asocio
 invitas vin al la

**XXII-KATALUNA
 KONGRESO de
 ESPERANTO**

KONGRESEJO:
 ESTUDI GENERAL DE LLEIDA
 Rambla d'Aragó

LLEIDA

31 oktobro
 2 novembro
 1986

(UNIVERSITATO)

La venonta numero aperos fine de Decembro 86 aŭ komence de Januaro 87
 Bonvolu sendi viajn kontribuojn plej malfrue la 29an de Novembro al
 Jean Hénin Route de Montcayroux 48500 La Canourgue (tel.66 32 86 36)

* * *